# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 5 Majo, 2015



*Kara Leganto, oni diras, ke homaro evoluas laŭ spiralo, kaj post buntaj numeroj venis vico al iomete seka informa eldono de la bulteno. Sur ĝiaj paĝoj vin atendas raporto pri la aprila kunsido, dum kiu Antono Marsh demonstras sian lingvan instru-metodon.*

*E-klubo el nia litova ĝemelurbo Vilno invitas al sia 49-a (!) E-boatado laŭ Ignalina lagaro. Vin atendas ankaŭ inform pri planata komuna kanada-usona E-kongreso. Bedaŭrinde tiu tandemo malgajnis en konkurso por UK en 2017 – venkis Seulo (Sud-Koreio). Espereble, Nordameriko gastigos UK-on en 2017. Ni esperu kaj vidu!* –La Redakcio

## Antono Marsh Prezentas Sian Metodon



Antono (Tony) Marsh estas lingvo-trejnisto, kiu instruas anglan, hispanan, portugalan, araban, francan, italan kaj ĉinan. Li instruis al homoj de FBI (Federacia Oficejo de Enketado), Usona Mararmeo, Motorola, mond-pokala piedpilkisto, membro de Ilinojsa parlamento kaj multaj aliaj. Li evoluigis metodon por instrui lingvon, nomata kiel *Metodo de Tony Marsh*.

En sia prezento li profiligis la ĉefajn principojn de sia metodo. Unue, multaj homoj lernas lingvon pro lernado, kaj nur esperas iam uzi ĝin. Antono instruas, ke vi devas uzi lingvon pro uzi ĝin, kaj lernado venas nature. Due, Konversacio instruas Strukturon, kaj Strukturo kreas Konversacion. Tio signifas, ke vi komencu per konversacio – kiel ajn simpla – kaj de tio vi lernos la ŝablonojn, kiujn oni necesas diveni. Unufoje vi havas ŝablonon, ekzemple, “Mi parolas, vi parolas?” – vi povas uzi tiun ŝablonon por krei pluan konversacion. Fine, li instruas, ke verboj estas ujoj de vortprovizo. Li diris “imagu skribon sur taso kun vortoj ‘mi estas’”. Nun imagu ĉiujn vortojn kaj frazojn – eĉ longajn frazojn – kiujn vi povus skribi sur peceto de papero kaj meti en tiun tason. Mi estas ... Antono, mi estas ... de Ŝikago, mi estas ... ĉe la maja Esperanta kunveno! Aldonu “Ĉu vi?” je la komenco de la frazo, kaj vi havos ĉion necesatan por konversacio. Antono instruis, ke ĉiam oni trejnu en kunteksto, gajnante sperton de komunikado. Komencu per temo, demandu, respondu, lernu la verbon, aldonu vortprovizon kaj havu konversacion. Tio estas la *Metodo de Tony Marsh*:

| 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 |
|---|---|---|---|---|---|
| Elektu temon | Demandu | Respondu | Lernu verbon | Aldonu vortprovizon | Konversaciu |

Bedaŭrinde, Antono ne respondis, kial li ekinteresiĝis pri Esperanto. *–Preparis Araneo*

## Seulo Gastigos la 102-an UK

La ĉefurbo de Korea Respubliko, Seulo, gastigos la 102-an Universalan Kongreson de Esperanto en la jaro 2017. La Estraro de UEA devis diskuti nekutime longe antaŭ ol fari la elekton inter Seulo kaj la kanada Montrealo, ĉar la invitoj de ambaŭ urboj estis zorge preparitaj kaj detale dokumentitaj. Ambaŭ lokoj prezentis tre bonajn kondiĉojn por sukcesa okazigo de la plej grava Esperanto-evento de la jaro. Pri tio raportis jam pli frue la Ĝenerala Sekretario Martin Schäffer kaj la Konstanta Kongresa Sekretario Clay Magalhães, kiuj pasintjare faris esplorviziton al ambaŭ lokoj.

La Universala Kongreso okazos en Seulo por la dua fojo. En 1994 ĝi gastigis la 79-an UK kun 1776 aliĝintoj. Korea Esperanto-Asocio estas unu el la plej viglaj landaj asocioj de UEA. Pri tio elstare atestas ankaŭ la fakto, ke la nombro de individuaj membroj en Korea Respubliko pli ol duobliĝis pasintjare; el 52 al 112. *–UEA*

# E-Boatado en Litovio



Kiel ĉiujare Vilniusa Junulara Esperanto-klubo “Juneco” organizas jam la **49-an BOATADO**-n, kiu okazos en Paluŝe, situanta 5 km okcidenten de Ignalina, Ignalina distrikto en la Nacia parko de Aŭkŝtaitija, la 29-31an de Majo. Dum 3 tagoj ni ekskursos kaj traboatos pli ol 20 lagojn kaj lagetojn, riverojn kaj riveretojn. Vizitos muelejon de Ginuĉiai, kie okazos akvaj proceduroj sub la akvofala duŝo, en insulo de lago Baluoŝas ni festos naskiĝtagojn de naskiĝintoj en Majo, okazos nokta promenado al la grandega monto Ladakalnis, Baptado de unufojaj boatadantoj. En la Baptado povos partopreni ĉiuj jam baptitaj partoprenantoj. Ludoj, kantoj, lignofajro, varma vespermanĝo, bela naturo atendos vin ĉiuvespere en tendarlokoj. Ankaŭ bonvolu prepari kulturan programon por internacia vespero.

Dum Boatado viajn orelojn ĝojigos nur Esperantaj vortoj, ĉar aliaj lingvoj estos malpermesitaj kaj tion gardos la sekreta Verda policisto.

Bonvolu aliĝu laŭ ebleco pli frue, sendante aliĝilon al Marijus mardi@takas.lt. Informu, ĉu vi havos propran tendon kaj dormosakon. Se ne havos, Vi ricevos surloke de organizantoj.


Loko kaj tempo de kolektiĝo: la 29-an de Majo matene en urbeto Paluŝe, situanta 5 km okcidenten de Ignalina sur lagbordo de Luŝiai-lago. Ankaŭ eblas atingi Paluŝe la 28-an de Majo vespere, kai noktumi tie ĉe la lago en tendo. El Vilno (Vilnius) al Ignalina veturas trajnoj kaj busoj. Trajna vojaĝo daŭras 1h. 50 min. Bileto kostas 4,05 EUR. Se vi alvenos per propra aŭto, ĝin eblos starigi ĉe boatluejo en Paluŝe. Trajnoj el Vilno al Ignalina: 08.13 aŭ vespere 16.35; 18.39 h. (sed bonvolu kontrolu ĝustan tempon).

Manĝado: prenu tiom da manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, ke sufiĉu laŭ voje kaj por vi, kaj por via geamiko ☺. *Teon, supon kaj kaĉon zorgos kaj preparos ni, organizantoj*. Prenu ilojn kaj ujojn por manĝi, kuiri kafon. Ni avertas, ke freŝa aero kaj intensiva remado mirakle plibongas apetiton. Vendejo laŭ voje estos nur en Ginuĉiai (Sabate).


Kotizo: por lernantoj/studentoj – 10 Eur; por plenkreskuloj – 15 Eur;

Ĝis la revido en Botado-2015! ☺

# La Komuna Kongreso




La Komuna Kongreso, Esperanto-USA/Kanada Esperanto-Asocio okazos la 26-29an de Junio, 2015, en International Institute of Metropolitan Detroit, Detroito, Miŝigano. Plia informo estas tie chi: http://esperanto-usa.org/retbutiko/index




# Ses Viv’etik’eroj

*Antaŭ ol preĝi – vi kredu,*
*Antaŭ ol paroli – vi aŭskultu,*
*Antaŭ ol elspezi – vi gajnu,*
*Antaŭ ol skribi – vi pensu,*
*Antaŭ ol ĉesi – vi provu,*
*Antaŭ ol morti – vi vivu!*

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave.
Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Cobbler Square Loft Apts.**
**1350 N. Wells St., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t.**

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

**26an de Majo** – Kartvela poeto Ŝota Rustaveli (preparas Araneo)

**28an de Junio** – Tradicia kluba pikniko

**28an de Julio** – Temo estos anocata. *** Atenton! Julia kunsido okazos en malnova loko: Sulzer Regional Public Library, 4455 N. Lincoln Ave, Chicago, IL.

**28an de Aŭgusto** – Partoprenintoj raportas pri la 100-a UK

Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro laŭ la numero (773) 344-2276. Vi rajtas preni vian ŝatatajn ne-E-amikojn, manĝaĵojn kaj trinkaĵojn (dolĉakvon, bieron, vinon ktp).